# Esperanto - La Bitbulteno 108

esperanto.es

## NUEVA EDICIÓN DE LOS CURSOS DE ESPERANTO EN LA UNED

Ya está abierto de nuevo el plazo de matrícula para los cursos de idiomas de la Universidad Nacional de Educación a Distancia (UNED), entre los cuales los cursos de esperanto, en los tres niveles A2, B1 y de nuevo este año por segunda vez el B2. Los cursos se imparten en colaboración con la Federación Española de Esperanto.

Recordamos que los cursos B1 y B2 se imparten en esperanto, por lo que son aptos también para personas interesadas fuera de España, que también pueden matricularse y examinarse en los centros asociados de la Universidad. Consulta más detalles en este artículo o en este otro de la web uea.facila (en esperanto fácil, con informaciones del año pasado, pero aún validas).


El plazo de matrícula estará abierto hasta el 21 de octubre y el curso comenzará en noviembre. Consulta la información práctica en: https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html.

Los cursos incluyen sesiones de conversación con un profesor. La Federación busca profesor de conversación para los cursos y pronto publicará las condiciones. Si eres experto esperantista y tienes interés escríbenos (a

admin@esperanto.es
).

El grupo de esperanto de Valencia ha anunciado la convocatoria de becas para alumnos de la Comunidad Valenciana; puedes ver los detalles en este enlace. También el Liceo Madrileño de Esperanto planea conceder cuatro becas para habitantes de la región de Madrid, que cubrirá parte de la matrícula; escribe a

madrid@esperanto.es
para conocer los detalles.




## NO SE ACABAN LOS CONGRESOS DE ESPERANTO EN ESPAÑA

Como anunciamos en anteriores números, este verano han tenido lugar numerosos encuentros nacionales e internacionales de esperanto, entre los cuales algunos muy importantes en España. Pero las posibilidades de participar en un encuentro de amigos, con interesantes actividades en esperanto, no se han terminado. Y queremos destacar especialmente los dos encuentros que tendrán lugar en el puente de octubre próximo.

En Málaga tendrá lugar entre el 9 y el 12 de octubre el 22º Congreso Andaluz de Esperanto, conjuntamente con el encuentro de la "Esperanta Naturamikaro" (Amigos de la Naturaleza). Puedes ver los detalles sobre alojamiento y programa, así como apuntarte en esta web.

También en el puente del 9 al 12 de octubre tendrá lugar el 41º Congreso Catalán de Esperanto, en la localidad de Reus. Puedes ver los detalles ya en la web: kongreso.esperanto.cat.

Recordad que se pueden encontrar muchos otros encuentros, desde los más internacionales hasta los locales, e incluso muchos en línea, a través del sitio web EventaServo.org.




## PREMIO DE POESÍA EN EL PRÓXIMO CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

Aunque aún queda más tiempo, también se está trabajando ya sobre el próximo congreso español, que tendrá lugar a comienzos de octubre del próximo año en la localidad de Herrera del Duque, en la provincia de Badajoz. En breve estará disponible la página web, con todos los detalles.

Como plato fuerte del congreso podemos mencionar el concurso internacional de poesía en esperanto "Miguel Fernández" que patrocina el Ayuntamiento de la ciudad, ya anunciado oficialmente. Puedes leer sus bases aquí.

Participa: se trata de una oportunidad única de dar a conocer la poesía en esperanto en medios ajenos a nuestra comunidad.




**COMUNICACIÓN CON LAS NACIONES UNIDAS TAMBIÉN EN CASTELLANO**

La Asociación Universal de Esperanto mantiene una oficina en Nueva York, que se encarga de las relaciones con la Organización de las Naciones Unidas y otros organismos asociados. Entre otras actividades, la oficina edita un boletín informativo, con informaciones sobre el movimiento esperantista, remitido a los diplomáticos y otro personal interesado. Este boletín se publica en esperanto, inglés, francés y, desde hace unas semanas, también en español.

Puedes leer el último número en pdf en este enlace. Textos previos y en otros idiomas se pueden encontrar aquí.

También se elaboran diversos comunicados con ocasión de días internacionales significativos, como el Día Internacional de la Paz que tendrá lugar el próximo 21 de septiembre. Y también puedes leer en castellano la resolución que con el título "Voluntariado al servicio del desarrollo sostenible" aprobó el pasado congreso mundial de esperanto en Graz.




**SEMANA DE LA PAZ Y LAS LENGUAS**

Además del citado Día Internacional de la Paz, este mes de septiembre se celebra otro muy importante para el mundo esperantista: el Día Europeo de las Lenguas el sábado 26. Al igual que en años pasados, la Unión Europea de Esperanto (EEU) propone combinar estas dos fechas en la "Semana de las Lenguas y la Paz".

La Federación Española de Esperanto quiere animar a los clubes locales a celebrar los Días de la Paz y de las Lenguas y a dar a conocer los objetivos de nuestro movimiento en su ámbito.

**CELEBRACIÓN DEL ANIVERSARIO DEL GOBIERNO VASCO**

Durante este año se está celebrando el 90º aniversario del primer gobierno vasco, constituido durante la guerra civil. En una serie de biografías publicadas por el periódico digital eldiario.es se menciona la relación al esperanto de dos de los consejeros de ese gobierno, Juan Gracia y Santiago Aznar. Sobre su figura y su influencia se impartió una charla en en el pasado Congreso Español de Esperanto celebrado en Vizcaya.




**RENOVACIÓN DE LA WEB DE LA ASOCIACIÓN VALENCIANA, TAMBIÉN PARA JUGADORES**

En las últimas semanas, la asociación valenciana ha renovado ampliamente su web y ha añadido mucho contenido nuevo: sobre la historia del esperanto en Valencia, diversas herramientas de aprendizaje e incluso juegos de idiomas para hablantes de esperanto o para quienes estén aprendiendo español y valenciano.

Durante los viernes de septiembre, se ha programado unas sesiones de chat y juegos en el canal de Discord del grupo, abierta a todo el mundo. Habrá reunión durante una hora para jugar a los juegos de la web mientras se charla: sopa de letras, crucigrama, misterio del día, cinco pistas, «¿qué lengua es?»... Encuentra todos los juegos en: https://valencia.esperanto.es/es/juegos/. Las sesiones tendrán lugar los viernes, 11, 18 y 25 de septiembre de 2026, de 20:00 a 21:00 (hora española). Más información en EventaServo.

## CURSOS PRESENCIALES EN CLUBES Y ASOCIACIONES

Además de los cursos de la UNED y de otros en red para hispanohablantes, anunciados por la Asociación Universal de Esperanto, tras la vuelta del verano varias asociaciones esperantistas han programado cursos presenciales.

Por ejemplo, puedes contactar con la asociación Liberanimo de Teruel, que impartirá un curso en la sede de la Fundación Ibercaja desde el 21 de septiembre. En Zaragoza se ha anunciado un curso organizado por Frateco, los martes desde el 29 de septiembre; para apuntarse visitar la sede o escribir a: fratecoesperanto@yahoo.es. En Madrid el curso comenzará en la sede del Liceo Madrileño en octubre. También Valencia ha anunciado cursos, a falta de concretar los detalles.

En Sevilla están previstos dos cursos: un curso universitario en la Facultad de Turismo y Finanzas y otro en el Centro Cívico «Las Sirenas».

La Asociación Catalana de Esperanto ha programado diversos cursos: uno durante el Congreso de Reus. Otro curso en red "Baza Esperanto 2", un curso básico en Barcelona los martes desde el 20 de octubre en la Biblioteca Jaume Fuster. y cursos de conversación en Barcelona y Vic. Para apuntarse o pedir más información se puede escribir a cursos@esperanto.cat.

Si vuestro grupo organiza otros cursos no citados, informadnos e intentaremos darlos a conocer a través de los canales de la Federación Española de Esperanto.




## NOVA ELDONO DE LA KURSOJ DE ESPERANTO EN UNIVERSITATO UNED

Jam malfermiĝis la periodo de enskribiĝo en la kursoj de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED), en la tri niveloj (laŭ la Eŭropa Referenckadro) A2, B1 kaj denove ĉijare B2. La kursoj estas instruataj kunlabore kun Hispana Esperanto-Federacio.

Ni memorigas ke la kursoj B1 kaj B2 estas instruataj en Esperanto mem, do ankaŭ homoj ekster Hispanio povas enskribiĝi, kaj ekzameniĝi en multaj urboj ĉefe en Eŭropo kaj Latinameriko. Vidu pliajn detalojn (de la pasinta jaro, sed esence ankoraŭ validaj) en tiu ĉi artikolo de la retejo uea.facila, en pli facila lingvaĵo.

La periodo de enskribiĝo estas malfermita ĝis la 21a de oktobro kaj la instruado komenciĝos en novembro. Legu la praktikajn informojn (en la hispana, sed se vi havas malfacilaĵojn pri kompreno de la hispana, bv kontakti kun la Hispana Esperanto-Federacio) ĉe la adreso: https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html.

La kursoj inkludas sesiojn por konversado. HEF serĉas konversacian instruiston por la kursoj, kaj baldaŭ anoncos la kondiĉojn. Skribu al ni (

admin@esperanto.es
) se vi estas interesataj.

La Esperanto-grupo de Valencio anoncis alvokon por stipendioj por studentoj el la Valencia Komunumo; vi povas vidi la detalojn ĉe ĉi tiu ligilo (kaj en la suba afiŝo). Ankaŭ Madrida Esperanto-Liceo planas doni kvar stipendiojn por loĝantoj en la madrida regiono, kiuj kovrus parton de la aliĝkotizo laŭ iuj kondiĉoj; skribu al

madrid@esperanto.es
por koni la detalojn.



**NE FINIĜAS LA KONGRESOJ DE ESPERANTO**

Ĉi-somere okazis multaj naciaj kaj internaciaj esperantaj kunvenoj, inkluzive de kelkaj tre gravaj en Hispanio. Sed la ŝancoj partopreni en amika renkontiĝo, kun interesaj agadoj en Esperanto, ne finiĝis. Kaj ni volas aparte reliefigi la du kunvenojn okazontajn dum la venonta oktobra longa semajnfino.

En Malago, la 22-a Andaluzia Esperanta Kongreso okazos inter la 9-a kaj 12-a de oktobro, lige kun la kunveno "Esperanta Naturamikaro" (Amikoj de la Naturo). Vi povas trovi detalojn pri loĝado kaj la programo, kaj ankaŭ registriĝi, en ĉi tiu retejo

Ankaŭ dum la oktobra longa semajnfino, la 41-a Kataluna Esperanta Kongreso okazos en la urbo Reus. Vi povas trovi detalojn en la retejo: kongreso.esperanto.cat.

Memoru ke oni povas trovi multajn aliajn renkontojn, el la plej internacia, ĝis la lokaj kaj eĉ multaj retaj, pere de la retejo EventaServo.org.




**PREMIO DE POEZIO ĈE LA VENONTA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO**

Kvankam ankoraŭ restas iom da tempo, la preparoj jam okazas por la sekva Hispana Kongreso, kiu okazos komence de oktobro de la venonta jaro 2027 en la urbo Herrera del Duque, en la provinco Badajoz, regiono Ekstremaduro. La retejo, kun ĉiuj detaloj, baldaŭ estos havebla.

Kulminaĵo de la kongreso estas la Internacia Konkurso de Esperanta Poezio "Miguel Fernández", sponsorita de la urba konsilantaro, kaj jam oficiale kunvokita. Vi povas legi la regulojn en la hispana (en la retejo de la urbestraro) kaj en Esperanto.

Partoprenu: ĝi estas unika ŝanco montri Esperantan poezion al publiko ekster nia komunumo.




**KOMUNIKADO KUN UNUIĜINTAJ NACIOJ ANKAŬ EN LA HISPANA**

Universala Esperanto-Asocio havas oficejon en Novjorko, kiu prizorgas rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizaĵoj. Inter aliaj agadoj, la oficejo eldonas bultenon kun informoj pri la Esperanto-movado, sendatan al diplomatoj kaj aliaj interesitaj personoj. Ĉi tiu bulteno estas eldonita en Esperanto, angla, franca, kaj, ekde antaŭ kelkaj semajnoj, ankaŭ en la hispana.

Vi povas legi la plej novan numeron en PDF-formato ĉe ĉi tiu ligilo. Antaŭaj numeroj kaj tekstoj en aliaj lingvoj troveblas ĉi tie.

La asocio ankaŭ pretigas diversajn deklarojn por signifaj internaciaj tagoj, kiel ekzemple la Internacia Tago de Paco, kiu okazos la 21-an de septembro. Vi ankaŭ povas legi en la hispana la rezolucion titolitan "Voluntariado al servicio del desarrollo sostenible", adoptitan de la lasta Monda Kongreso de Esperanto en Graz (en Esperanto, tie ĉi)

**SEMAJNO DE LINGVOJ KAJ PACO**

Krom la menciita Internacia Tago de Paco, dum tiu ĉi monato oni celebras alian tagon tre gravan por la esperantista komunumo: la Eŭropan Tagon de Lingvoj, sabate la 26-an. Kiel en aliaj okazoj, Eŭropa Esperanto-Unuiĝo proponas kunligi tiujn du datojn en la “Semajno de Lingvoj kaj Paco”.

Kiel EEU asertas en sia mesaĝo: "Ankaŭ la temo elektita ĉi-jare de Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Komisiono por la Tago de Lingvoj estas aparte alloga, ĉar ĝi priskribas per trafa sintezo nian aliron al la vivo kiel internacia komunumo: “Lingvoj kunigas!” (vidu ĉe la retejo https://edl.ecml.at/ por la mesaĝo en viaj naciaj lingvoj). Ĝi tute taŭgas do ankaŭ por la Tago de Paco, ĉar, per vere malmultaj vortoj, ĝi komprenigas, ke diferencoj neniam pravigas konfliktojn, kio puŝis Zamenhof-on krei sian mirindaĵon".

Hispana Esperanto-Federacio volas instigi la lokajn klubojn festi la Tagojn pri paco kaj pri lingvoj, kaj diskonigi la celojn de nia movado.




**FESTADO DE LA DATREVENO DE LA EŬSKA REGISTARO**

Ĉi-jare oni kunmemoras oficiale la 90-an datrevenon de la unua eŭska registaro, formita dum la Hispana Enlanda Milito. Serio de biografioj publikigitaj de la reta gazeto eldiario.es mencias la ligon al Esperanto de du el la membroj de tiu registaro, Juan Gracia kaj Santiago Aznar.

Dum la pasinta Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Biskajo okazis prelego pri ambaŭ samideanoj.




**GRAVA RENOVIGO DE LA RETEJO DE LA VALENCIA ASOCIO, ANKAŬ POR LUDEMULOJ**

Dum la lastaj semajnoj la Valencia grupo faris kompletan renovigon de sia retejo kaj aldonis amason da novaj enhavoj: pri la historio de Esperanto en Valencio, diversspecaj lerniloj, kaj eĉ lingvoludoj por esperantistoj aŭ por tiuj, kiuj lernas la hispanan kaj valencian lingvojn.

Dum septembraj vendredoj estas planita babilado kaj ludado kune ĉe la Discord-kanalo de la grupo, malferma por ĉiu ajn interesito. Oni kunvenos dum unu horo por kune ludi la ludojn de la retejo dum oni babilos: vortserĉo, krucvortenigmo, la mistero de la tago, kvin indicoj, Kiu lingvo?... Trovu ĉiujn ludojn ĉe: https://valencia.esperanto.es/eo/ludoj. Oni atendas vin sum vendredoj, la 11-an, la 18-an kaj la 25-an de septembro 2026, 20:00–21:00 laŭ hispana horo. Pliajn informojn: en Eventa Servo: https://eventaservo.org/e/12b3d8.

**KURSOJ ĈEESTAJ EN KLUBOJ KAJ ASOCIOJ**

Aldone al la kursoj de UNED kaj aliaj retaj jam anoncitaj de UEA, pluraj esperantistaj asocioj planis ĉeestajn kursojn post la somera paŭzo.

Ekzemple, vi povas kontakti kun la asocio Liberanimo en Teruelo, kiu ofertos kurson ĉe la sidejo de la Fondaĵo Ibercaja ekde la 21a de septembro. En Zaragozo estis anoncita ĉeesta kurso, en la sidejo de Frateco, la mardojn ekde la 29-a de septembro; por aliĝi vizitu la sidejon aŭ skribu al:

fratecoesperanto@yahoo.es
. En Madrido, la kurso komenciĝos ĉe la Madrida E-Liceo en oktobro. Valencio ankaŭ anoncis kursojn, kvankam detaloj ankoraŭ ne estas konkretigitaj.

Du kursoj estas planataj en Sevilo: universitata kurso ĉe la Fakultato pri Turismo kaj Financo kaj alia ĉe la Civitana Centro "Las Sirenas".

Kataluna Esperanto-Asocio anoncis plurajn kursojn: unu dum la Kongreso de Reus, alian retan kurson, "Baza Esperanto 2", bazan kurson en Barcelono ĉiujn mardojn ekde la 20a de oktobro ĉe la Biblioteko Jaume Fuster, kaj konversaciajn kursojn en Barcelono kaj Vic. Por registriĝi aŭ peti pliajn informojn, vi povas skribi al.cursos@esperanto.cat.

Se vi konas aliajn kursojn, skribu al ni kaj ni provos diskonigi per la komunikiloj de HEF.




ESPERANTO